# ATEISMO

REVUO DE ATEISTA TUTMONDA ESPERANTO-ORGANIZO




**Majo 2025**

N-ro 40 | www.ateisto.org

# VORTO DE LA REDAKTORO

Mi ŝatus komenci per eble stranga, eĉ ridinda ideo: la kreado de aparta ŝtato por ateistoj. Se ni ateistoj povus havi nian propran teritorion ie en la mondo, ni ne plu estus ĝenataj de religiuloj, speciale fundamentistoj, ni ne spertus religiajn konfliktojn, ni ne suferus diskriminacion nek minacojn nek izoligon. Ni ne plu estus minoritato, ofte eta, sed granda majoritato. Kaj kompreneble, la oficiala lingvo de la ateistoj, enmigrintaj el multaj landoj, estus Esperanto! Ĉu tia ŝtato estus pli absurda ol ŝtato kreita por anoj de specifa religio aŭ ŝtato regata de la klerikaro de specifa religio?

Kelkaj landoj pensigis min pri tiu ideo: Israelo, ŝtato kreita speciale por judoj, religia grupo, kvankam parte ankaŭ etna-nacia grupo; Irano, teokratia lando regata de ŝijaismaj klerikoj, do malateisma ŝtato iasence; Pakistano, ŝtato kreita speciale por la islamanoj de la iama Brita Hindio; kaj tute kontraste Ĉeĥio, kie preskaŭ 70% de la loĝantoj estas efektive ateistoj (pri kio temas artikolo ĉi-numere). Ĉeĥio estas do iasence ateista ŝtato. Tamen ĝi ne estis kreita tiucele, kaj estas, kiel multaj aliaj, ŝtato de specifa etna grupo.

Israelo kaj Irano lastatempe intermilitis – israelaj misiloj atingis Teheranon, kaj iranaj misiloj Telavivon, kelkcent homoj estis mortigitaj. Pakistano kaj Barato ankaŭ intermilitis post masakro de hinduoj en Kaŝmiro, pri kio Barato kulpigis sian islaman najbaron. Malgraŭ ke Barato estas konstitucie sekulara, ĝiaj respond-atakoj havis forte hinduan religian motivon (kiel atentigas nia prezidanto en sia kontribuo). En diversaj kazoj, religio certe estas instigilo de konfliktoj inter ŝtatoj, kaj inter ŝtatoj kaj kvazaŭŝtataj fortoj (ekz. Israelo kaj Ĥamaso).

Nek la kreado nek la regado de ŝtatoj surbaze de religio estas io tre bona, kvankam la kreado de Israelo havis ian etnan-nacian bazon kaj estis motivita de jarcentoj da persekutado kaj diskriminacio. Iom simile Pakistano estis la rezulto de sentoj de malsekureco kaj duarangeco en lando kun granda hindua majoritato, sed verdire ĝi estis unuiĝo de hindaj regionoj jam havantaj islamanajn plimultojn. Por pravigi ĝian kreadon, oni asertis, ke la islamanoj de Brita Hindio estas aparta nacio. Same oni povus deklari ateistojn aparta nacio!

En ŝtatoj kiel Irano kaj Pakistano, religia libereco kaj egalrajteco por minoritatoj, ĉu alireligiaj aŭ senreligiaj, estas serioza problemo. Sed ankaŭ en diversaj alispecaj ŝtatoj ekzistas malfacilaĵoj tiurilate. Tial ni demandis la legantojn: *"Ĉu ateistoj aktivu en la protektado de religia libereco? Se jes, pri kiaj agadoj ili okupiĝu por protekti ĝin?"* Ni ricevis multajn interesajn respondojn, kiujn ni aperigas ĉi-numere. Aliflanke la privilegiado de religioj kaj diskriminacio kontraŭ senreligiuloj estas daŭra problemo, de Italio al Indonezio, kiel vi vidos en artikoloj pri tiuj landoj. Krome vi trovos kritikan aliron al Dante, pensojn pri antikva raciismo, kaj proponojn por nia asocio. Mi invitas vin al tre leginda numero!

Kovril-foto: Český Krumlov, Ĉeĥio (Fonto: Google Maps)

# ATEISMA VIVO

## La protektado de religiaj rajtoj: ĉu pli grava ol defendi aliajn rajtojn?

*Anna Lowenstein (Britio)*

Ĉu ateistoj aktivu en la protektado de religia libereco? Al tiu demando mi respondas: ĉu matematikistoj aktivu por protekti religian liberecon? Ĉu bibliotekistoj aŭ kelneroj aktivu tiucele? Ĉu ruĝharuloj? Esti ateisto simple signifas, ke oni ne kredas je Dio aŭ dioj. Tio en si mem (kontraste al humanismo) ne kunportas ian ajn filozofion aŭ moralan regularon.

Se ni decidos aktivi por protekti religian liberecon, ni faros tion ne ĉar ni estas ateistoj, sed ĉar ni estas membroj de la homaro. Same kiel ĉiuj homoj kun konscienco, ni devus esti zorgoplenaj pri subpremado de aliaj homoj, ĉu pro religio, sekso, raso aŭ io alia. Kompreneble devus gravi al ni, ke oni endanĝerigas la vivon de kristanoj en Afganujo aŭ de bahaanoj en Irano.

Ĉu ni persone batalu por defendi tiujn homojn estas alia demando. Ne estas aparta kialo, kial ateisto okupiĝu specife pri religiaj rajtoj, kontraste kun la multenombraj aliaj specoj de homaj rajtoj. La demando en si mem estas bazita sur la supozo, ke ateismo estas speco de religia kredo, kaj do ke ni devus aparte interesiĝi pri religiaj rajtoj.

Ekzistas tiom da maljustaĵoj en la mondo, ke ne eblas batali kontraŭ ĉiuj. Necesas elekti tiujn, pri kiuj oni volas aktive okupiĝi, kaj distingi ilin de tiuj, pri kiuj oni bedaŭras, sed ne aktive laboras. Verŝajne kiel ateistoj ni aparte kunsentas la sorton de ateistoj en Pakistano, ĉar ni pli aktive identiĝas kun ili ol kun hinduoj aŭ aliaj malplimultoj en la sama lando. Tio ne signifas, kompreneble, ke ni estu indiferentaj pri la sorto de hinduoj, tamen estas natura afero, ke ĝi malpli tuŝas nin ol tiu kun kiu ni persone identiĝas.

Estas multaj kazoj precipe en iuj aziaj landoj de homoj devigataj kontraŭvole konvertiĝi al islamo. Laŭ Vikipedio tio okazas en iuj regionoj de Pakistano, Irako kaj Libio. La viktimoj estas plejparte siĥoj, hinduoj kaj kristanoj. Kun tiuj ni facile povas identiĝi, ĉar ili estas devigataj forlasi siajn proprajn tre profunde tenatajn kredojn kaj ŝajnigi sekvi fremdan religion. Oni facile povas imagi sin en tia situacio. Kion oni farus, se oni estus devigata konvertiĝi tute kontraŭvole al iu religio, kaj por la propra travivo ŝajnigi, ke oni efektive kredas ĝin? Eĉ pli malbone, vidi la proprajn infanojn devige edukataj en tiu religio, ĝis ili aktive subtenas ĝin?

Kaj pri kiaj agadoj ni okupiĝu por protekti religiajn liberecojn, laŭ la demando de la redaktoro? La plejmulto el ni verŝajne subtenas nur pasive, per subskribo de petskriboj, eble per donacado de mono al la koncerna bonfara organizaĵo, eble per legado aŭ eĉ per verkado de artikoloj, por ke la koncerna situacio estu pli vaste konata.

Sed kiel mi skribis supre, ekzistas tiom da maljustaĵoj kaj aliaj problemoj en la mondo, ke ne eblas aktive okupiĝi pri ĉiuj. La grava afero estas elekti du aŭ tri, pri kiuj oni aparte zorgas, kaj dediĉi sian energion kaj sian financan subtenon al ili. Pli ol tion

neniu homa estaĵo povas fari.

Tamen la demando povus esti interpretata ankaŭ alimaniere. Ĝi povus rilati ne nur al la tre serioza situacio ekzemple de kristanoj en norda Niĝerio, sed ankaŭ al la ĉiutagaj rajtoj de iuj ajn religiuloj en iu ajn lando. Kie estas, aŭ pli ĝuste, kie estu la limo de toleremo? En Usono, ekzemple, ekzistas movado de gepatroj, kiuj edukadas siajn infanojn hejme, por ke ili ne estu influataj de la "kontraŭreligiaj" mesaĝoj en la lernejoj, alivorte ke ili lernas la teoriojn de Darwin anstataŭ la Biblian rakonton pri la ekesto de la mondo.

Ĉu estas akcepteble, ke homoj malhelpu al siaj infanoj lerni la science akceptatan teorion pri la ekesto de specioj favore al mitologia rakonto de antaŭ 3000 jaroj? Kompreneble, neniu povas malhelpi, ke la gepatroj instruu tiun rakonton dum la infanoj estas hejme, sed ĉu ili rajtu forpreni ilin el la lernejo, por ke ili tute ne aŭdu la sciencan klarigon? Ĉu venas punkto, ĉe kiu necesas diri:

"Ni bedaŭras, sed ni ne povas permesi al vi fari tiujn neakcepteblajn agojn sen iu ajn kontraŭstaro"?

Se oni malpermesus al la gepatroj eduki siajn infanojn hejme, ili protestus, ke oni atencas iliajn religiajn rajtojn. Tio estas hipoteza demando, ĉar en Usono oni efektive permesas tion. En Francujo, aliflanke, oni ja malpermesas iujn aferojn, kiujn la homoj faras pro religiaj kialoj. Oni tiel rigore respektas la dividon inter religio kaj ŝtato, ke oni ne permesas al virinoj kovri la vizaĝon en publikaj lokoj pro siaj religiaj kredoj. Oni povus vidi tion kiel atencon kontraŭ iliaj religiaj rajtoj.

La malsama aliro en Usono kaj Francujo estas sekvo de malsamaj sintenoj en la du landoj rilate al individuaj rajtoj, kaj ankaŭ de la malsama rilato inter religio kaj la ŝtato. (Teorie en ambaŭ landoj ekzistas apartigo de la du, sed en la praktiko tiu disigo nur parte validas en Usono.) Kiu pravas? Ĉu oni permesu al homoj fari ion ajn pro siaj religiaj kredoj, aŭ ĉu oni malhelpu tion? Aŭ ĉu ekzistas iu meza vojo inter ekstrema permesemo kaj absoluta malpermeso?

## Justeco, religia libereco kaj ateistaj prioritatoj

Protektado de religia libereco ne estas prioritata temo por ateistoj kaj certe ne en demokratiaj landoj, kie kutime regas egalrajteco por ĉiuj tendencoj. Kompreneble en landoj, kie certa religio regas kiel la potenco, ne nur la aliaj religioj suferas pro diskriminacio sed plejofte la ateistoj eĉ ne havas la eblecon organizi sin. Laŭ mia supozo ateistoj devas esti toleremaj pro la fakto, ke ili praktikas liberpensadon. Ili do akceptu, ke aliaj homoj povas pensi alimaniere. Ili respektu la alipensantojn kiel personojn sed ne hezitu uzi la rajton kritiki alies pensmanierojn. Ateistoj devas do favori ĉies liberecon.

Tamen aktivi en protektado de religia libereco estas paŝo troa. Se ne estas religia libereco, tio estas kaŭzata de iu potenca religio aŭ aŭtoritata reĝimo. Kiel ateisto oni malaprobas tion, sed mi ne vidas praktikajn manierojn kontraŭstari tian situacion. Ni povas konsciigi pri la maljusteco kaj kondamni ĝin. La strebado al pli bona aŭ pli justa mondo estas komuna laboro de multaj organizaĵoj, kiuj celas egalrajtecon. Kiel ateisto oni klopodu kunlabori kun kiel eble plej multaj el tiuj organizaĵoj. Tiamaniere religia libereco aŭtomate efektiviĝos.

*Katja Lödör (Belgio)*

# Defendi religian liberecon… nur kadre de la homaj rajtoj

*Luís Ladeira (Portugalio)*

Defendi la rajton al religio estas defendi la homajn rajtojn, ĉar ĝi estas unu el la rajtoj, kiuj aperas en la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Kaj defendi la homajn rajtojn estas reliefigi aron da principoj laŭ kiuj ni devas orienti nian agadon – almenaŭ kadre de modernaj demokratiaj ŝtatoj kies konstitucioj baziĝas sur tiu deklaracio.

Sed ĉu ankaŭ ateistoj ie ajn, t.e. ene aŭ ekstere de tiaj ŝtatoj, devas defendi la religian liberecon? Unuavide tio ŝajnas kontraŭdiro. Se ateistoj konsideras religion nenecesa, kial defendi rajton al ĝi? Fakte ateistoj devus insisti pri la rajto al nereligieco kaj aktivi por tio. Tamen ĉar ĉi tiu religia rajto miksiĝas kun plurreligieco, kaj pli akcepteblas ateistumi en plurreligia ŝtato ol en unureligia – speciale kiam unureligia ŝtato signifas teokratian ŝtaton – kiu persekutas alispecajn religiulojn kaj ĉefe ateistojn, taktike ateisto iom profitos defendante la rajton al religio kaj religia libereco.

Sed ekzistas aliaj argumentoj, ne nur taktikaj, por defendi ĉi rajton. Defendi religiojn ne estas defendi ĉiujn erojn el tio, kion kelkaj religiuloj postulas, kiel religiaj aferoj (moralo kaj kutimoj), precipe kiam ili kontraŭas la homajn rajtojn. Pli precize, oni devas distingi inter religio kaj moralo. Moralo ne estas religio. Moralo estas aro da reguloj por interrilati socie. Ili devenas de socio, ne de iu ekstera fonto, kiel dio aŭ simila estaĵo. Historie homoj kunligis tion al dia volo, tamen se oni analizas tiajn regulojn, ili facile elmontras sian originon en socio. Kiam ekzemple Biblio postulas *ne deziru inon, sklavon aŭ beston kiu apartenas al alia viro*, tio klare spegulas sklavigan kaj patriarkan socion de antaŭ multaj jaroj. Do, defendi rajton al religio kaj plurreligieco estas nur defendi rajton de iu ajn al ritoj, kiuj celas kaj honori superan forton kaj gajni ĝian subtenon, kaj tute ne akcepti regulojn kaj kutimojn, kiuj kontraŭas homajn rajtojn. Do, kiam ateistoj defendas rajton al religio – disigante religion de moralo – ili plejparte defendas la nuntempan interhoman akordiĝon pri la homaj valoroj.

Cetere, religia sento elpurigita de eroj rasismaj, ksenofobiaj, seksismaj ktp povos helpi kunligi la homaron. Tiele ĝin komprenis Zamenhof. Esperanto, por la kreinto de nia lingvo, estis rimedo ne nur por interkomunikiĝi internacie sed ankaŭ por unuigi la homaron. Pro tio ĉiam Zamenhof klopodis kunligi lingvon kaj homaranismon. Lia *Deklaracio pri Homaranismo* (1913) bone spegulas lian intencon. Surbaze de tiu intenco estas nocio pri religio, kiu tute akordiĝas kun homaj rajtoj. Eĉ se homaranismo ne firmiĝis ene de la Esperanta movado restas ĉiam la **Interna Ideo**. Kaj respekte al la Interna Ideo, la esperantistoj devas respekti la homajn rajtojn. Inter ili, almenaŭ nuntempe, estas… rajto al religio.

Al la demando pri la agado de ateistoj, mi respondas ke temas precipe pri intelekta agado. Gravas klarigi kaj disvastigi la ideon, ke religio ne estas moralo kaj ke ĉiuj reguloj kaj kutimoj kontraŭ la homaj rajtoj devas esti forigitaj el la religioj!




# Ateistoj, penslibereco kaj religia libereco en Afriko

*Waziwazi Grace Germain (Demokratia Respubliko Kongo)*

La demando, ĉu ateistoj devus engaĝiĝi por la protektado de religia libereco, povas ŝajni paradoksa, precipe en afrika kunteksto, kie religio, ĉefe kristanismo kaj islamo, profunde trapenetras la socian, kulturan kaj politikan vivon. En Goma, Demokratia Respubliko Kongo, kie religia kredo estas ĉiea, ateistoj, kvankam malplimultaj kaj ofte stigmatizitaj, havas esencan rolon por antaŭenigi pensliberecon, kiu superas la barojn truditajn de religiaj institucioj. Tiu ĉi artikolo esploras tiun problemon, respurante la originon de religio en Afriko kaj ĝian historian instrumentigon kaj proponante konkretajn agojn por ateistoj en la defendo de religia libereco.

**Origino de religio en Afriko kaj ĝia instrumentigo**

Antaŭ la alveno de monoteismaj religioj, afrikaj socioj praktikis praajn formojn de spiriteco, riĉajn je diverseco, kiuj ligis komunumojn al ilia medio kaj prapatroj. Tiuj kredoj, ofte maljuste karakterizitaj kiel “paganaj” de koloniistoj, estis dinamikaj penssistemoj, favorantaj socian ekvilibron kaj kunekziston. Tamen, kun la eŭropa koloniigo kaj religiaj misioj ekde la 15-a jarcento, kristanismo enradikiĝis en Afriko, ofte perforte. En la Demokratia Respubliko Kongo, belgaj misiistoj ludis centran rolon en tiu entrepreno, ne por emancipi la

loĝantaron, sed por submeti ĝin al kolonia ordo.

La komenca celo de kristanismo en Afriko ne estis transdoni universalan spiritan mesaĝon, sed funkcii kiel ilo de dominado. Preĝejoj estis instrumentoj de mastrado, instruantaj obeemon kaj rezignacion al koloniigitaj popoloj, dum ili pravigis sklavigon kaj ekspluatadon. Afrikanoj estis prezentitaj kiel "sovaĝuloj" civilizotaj, kaj la Biblio estis uzata por pravigi ilian subpremadon. Tiu dolora pasinteco postlasis profundajn spurojn: hodiaŭ, preĝejoj en la Demokratia Respubliko Kongo, ĉu katolikaj, protestantaj aŭ evangeliismaj, ankoraŭ ekzercas konsiderindan influon, ofte je la kosto de individua libereco.

## Enfermado de mensoj per religiaj institucioj

En Goma, kiel en multaj afrikaj regionoj, preĝejoj ne kontentiĝas proponi spiritan kadron; ili trudas rigidajn dogmojn, kiuj limigas la kapablon de individuoj pensi libere. En kunteksto de malriĉeco, armitaj konfliktoj kaj necerteco, preĝejoj ekspluatas la vundeblecon de loĝantaroj, promesante miraklojn kaj dian savon. Tiu fenomeno estas precipe videbla en la multobliĝado de evangeliismaj preĝejoj, kie memproklamitaj pastroj postulas altegajn dekonaĵojn kaj manipulas kredantojn, plantante timon pri infero kaj aliaj malbenoj.

Tia forta religia manipulado enfermas mensojn en mallarĝajn kadrojn, kie ajna pridubo de kredoj estas perceptata kiel perfido aŭ herezo. Individuoj tiel perdas sian liberecon pensi preter la baroj truditaj de dogmoj. Ekzemple, temoj kiel sekseco, seksa egaleco aŭ scienco ofte estas tabuaj, ĉar ili kontraŭdiras religiajn instruojn. Tiu situacio sufokas novigadon, kreemon kaj kritikan debaton, kiuj estas esencaj elementoj por la disvolviĝo de dinamika socio.

## Rolo de ateistoj en la protektado de religia libereco

Kiel ateisto en Goma, mi perceptas religion ne kiel absolutan veron, sed kiel personan elekton, kiu neniam devus esti trudata. Paradokse, ateistoj, liberaj de dogmaj limigoj, estas bone poziciigitaj por defendi religian liberecon, ĉar ili komprenas la gravecon de konscienc-libereco entute. Protekti religian liberecon signifas garantii, ke ĉiu individuo povas kredi aŭ nekredi sen timo de persekutado, diskriminacio aŭ marĝenigo.

Jen kelkaj konkretaj agoj, kiujn ateistoj povas entrepreni en Afriko por antaŭenigi tiun liberecon:

1. **Konsciigado pri penslibereco**: Ateistoj povas organizi publikajn debatojn kaj studgrupojn por instigi kritikan pridubadon kaj montri, ke dubo ne estas peko, sed ilo de emancipado. En Goma, kie junuloj avidas scion, tiuj iniciatoj povus havi favoran eĥon.

2. **Defendo de rajtoj de minoritatoj religiaj kaj nekredantoj**: Ateistoj devas aliĝi al marĝenigitaj grupoj, kiel ekzemple adeptoj de tradiciaj religioj aŭ nekredantoj, por postuli leĝojn protektantajn konscienc-liberecon. En la Demokratia Respubliko Kongo, kie la konstitucio formale garantias tiun liberecon, ateistoj povas pledadi por ĝia efektiva aplikado.

3. **Lukto kontraŭ religia ekspluatado**: Ateistoj povas denunci la misuzojn de religiaj gvidantoj, kiel financan ekspluatadon aŭ psikologian manipuladon, kunlaborante kun lokaj amaskomunikiloj aŭ organizaĵoj de la civila socio. Tio helpus liberigi individuojn de la nevideblaj katenoj de preĝejoj.


4. **Antaŭenigo de laika edukado**: Subtenante eduksistemon, kiu prioritatigas sciencon, racion kaj universalan etikon anstataŭ religiaj dogmoj, ateistoj povas kontribui al la formado de generacio

kapabla pensi libere.

## Ateisma vizio por libera Afriko

Kiel ateisto, mi ne malakceptas la spiritecon de aliaj, sed mi forte kontraŭstaras ajnan formon de subpremo farita nome de religio. En Goma, kie religia kredo ofte estas rifuĝo antaŭ malfacilaĵoj, ateistoj havas la respondecon montri, ke vivo sen religio povas esti riĉa je senco, gvidata de kompato, racio kaj solidareco. Defendante religian liberecon, ni ne nur protektas la rajton kredi, sed ankaŭ la rajton dubi, pridubi kaj konstrui estontecon, en kiu ĉiu afrikano estos mastro de sia menso.

Religio, kiel ĝi estis trudita en Afriko, ofte estis armilo de subjugado. Hodiaŭ, ateistoj havas la ŝancon reverki tiun historion, antaŭenigante pensliberecon, kiu respektas ĉiujn konvinkojn, dum ĝi rompas la katenojn de subpremaj dogmoj. En Goma, kiel aliloke en Afriko, tiu lukto estas esenca por konstrui pli justan kaj kleran socion.




La centra parto de Afriko, kun landnomoj en la svahila (Mapo de: Google)

# Aktivi por religia libereco: strategioj por ateistoj

*Bill Maxey (Usono)*

Laŭ la Artikolo 18 de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj, "Ĉiu havas la rajton je libereco de penso, konscienco kaj religio…" inkluzive de libereco "manifesti…sian religion aŭ kredon per instruado, praktikado, adorado kaj observado".

Unuiĝintaj Nacioj tiel agnoskas religian liberecon kiel homan rajton, kaj ĝi efektive trovas lokon en la fundamentaj dokumentoj de multaj landoj. Tamen – kiel ni bone scias – eĉ tio ne garantias ke registaroj aŭ eĉ ĉiuj civitanoj permesos ĝian plenan observadon en la socio. Pro tio, ĉiu konscienca persono – des pli tiuj kiuj suferas pro diversspecaj atencoj, i.a. ateistoj – devus resti ĝisdata pri la stato de religiaj rajtoj en la propra lando (kaj eventuale ankaŭ en aliaj) kaj agadi kiel eble por protekti kaj plifortigi ilin. La malfort(iĝ)o de religia libereco efikas negative aparte sur ateistojn, do certe ili okupiĝu pri protektado de tiu rajto. Bonŝance, ĉar ĉiuj homoj (almenaŭ teorie) partoprenas tiun devon, ĉiam troviĝas personoj kaj organizaĵoj kiuj celas defendi homajn rajtojn.

Ni en Usono – mi ne scias pri aliaj landoj – disponas diversajn rimedojn por tia agado. Unue tamen utilas kompreni la trajtojn de la aktuala batalkampo. Atencoj okazas je la tri niveloj de regado: la loka, la ŝtata kaj la federacia. Kaj ĉiuj tri branĉoj de tiuj registaroj havas sian rolon en la atakoj kontraŭ religia libereco. Nemalofte la ekzekutiva (ekz. lokaj distriktaj aŭ lernejaj estraroj, ŝtataj postenuloj aŭ federalaj departementoj) mem kaŭzas la atencojn. La leĝfarantoj je ĉiu nivelo aprobas leĝojn kiuj favoras kristan(naci)ismon. La kortumoj kaj juĝistoj finfine verdiktas kaj tiel kreas precedentojn sur kiuj postaj kazoj baziĝos. Eblas do agadi sur diversaj kampoj kaj per diversaj strategioj.

Jen kelkaj manieroj agadi, ordigitaj laŭ la necesa elĉerpo de energio:

- Ni membriĝu en organizaĵoj kiuj ĉefe celas protektadon de religia libereco kaj subtenu ilin aktive kaj finance. Ili havas lertajn kaj spertajn advokatojn kiuj esploras raportitajn lezojn, avertas ties farintojn, iniciatas procesojn kaj foje preparas dokumentojn de *amicus curiae* (t.e. por influi juĝ-procesojn, en kiuj ili mem ne estas partioj). Paralele funkcias ankaŭ kleriga fako kiu okazigas interretajn seminariojn kaj ĉeestajn kongresojn por membroj, prizorgas aktivajn kontojn ĉe sociaj komunikiloj kaj kreas videojn en YouTube por informi kaj eduki la publikon.

- Ni restu ĝisdataj pri aferoj de religia libereco en nia propra regiono. Ni restu atentaj pri minacoj al ĝi, esprimu niajn opiniojn en trafaj manieroj kaj raportu la deliktojn al la naciaj organizaĵoj.

  - Tiuj organizaĵoj konservas datumbazojn kun lastatempaj informoj ne nur pri raportitaj atencoj sed ankaŭ pri atentindaj leĝprojektoj en ĉiu ŝtato. Ili dissendas al membroj oportunajn avertojn pri aferoj kiuj ardas en ilia proksimaĵo. Tio ebligas civitanojn konigi siajn opiniojn en la ĝusta momento al reprezentantoj en leĝfaraj ĉambroj.

  - Lertuloj kiuj aktivas per sociaj komunikiloj povas afiŝi taŭgajn tekstojn kiuj racie prezentas kaj prudente kritikas okazintaĵojn malrespektintajn religian liberecon. Ili klopodu eduki la legantojn kaj samtempe vigle defendi religiajn rajtojn. (Per tiuj ĉi interretaj rimedoj ni esperantistoj povas ankaŭ subteni niajn samideanojn en aliaj landoj kun simile malbonaj cirkonstancoj.)

- Ankaŭ eblas sendi leterojn pri la temo al la redakcio de lokaj aŭ regionaj ĵurnaloj aŭ eĉ verki artikolojn por diversaj periodaĵoj. Pliaj opcioj je la loka nivelo inkluzivas esprimi opiniojn en publikaj kunvenoj, prelegi en taŭgaj lokoj kaj organizi debatojn aŭ diskutpanelojn. Spertuloj pri teknologio kaj retoriko povas krei kaj afiŝi videojn por eduki multe pli vastan aron da interesatoj.

- Ni aliĝu al publikaj manifestacioj kiel eble, kun atentokaptaj afiŝtabuloj rilate niajn zorgojn, ĉu kadre de ĝenerala protesto ĉu okaze de grupagado specife rilate al minacoj al religia libereco. Ni kunlaboru ankaŭ kun aliaj grupoj – eĉ religiaj – kiuj agadas por protekti tiun rajton.

Ateistoj povos plene prosperi nur en medio kun tutsocia respekto al religia libereco. Sen ajna dubo ni devos aktivi en la protektado de tiu rajto. Neageme atendi ke aliaj defendu ĝin por nia profito estus granda maljustaĵo – kredeble eĉ peko.

## De religia libereco al racia pensado en Aŭstralio

Laŭ sia konstitucio Aŭstralio estas neŭtrala lando rilate religion: sekcio 116 malpermesas, ke la federacia parlamento aprobu leĝon, kiu starigas ŝtatan religion, trudas iun religian praktikon aŭ malpermesas la liberan praktikadon de iu ajn religio. Ĝi klare deklaras, ke neniu religia testo estu postulata kiel kvalifiko por iu ajn posteno en la nacia publika servo.

Dum la lastaj kvindek jaroj la nombro de tradiciaj religiuloj – t.e. kristanoj – konstante malkreskis. La lasta popolnombrado, en 2021, montris, ke 54% de la loĝantaro apartenas al iu religio. Kvankam la nombro de kristanoj malkreskas, enmigrintoj aldonas al la diverseco de religioj.

Malgraŭ tio, religio, kaj aparte kristanaj religioj, daŭre okupas gravan lokon en la kulturo. La Anzac-tago – kiam estas honoritaj la aŭstraliaj kaj novzelandaj soldatoj, kiuj helpis la britan armeon dum la unua mondmilito – komenciĝas per aŭrora diservo. La amaskomunikiloj longe raportis pri la sanstato de la lasta papo kaj pri lia morto. La ĉefministro – ĉu nur pro tio ke li estis edukita en la katolika kredo? – ĉeestis la ceremonion de rekono de la nova papo.

Tamen se la nuna tendenco ne ŝanĝiĝas, mi opinias, ke ne necesas agi por la protektado de religia libereco. Necesas pli aktivi por ke infanoj ricevu solidan edukadon ebligantan ilin racie pensi, mem esplori la mondon kaj ties originon kaj evoluon – alivorte por ke ili akiru kritikan sagacon kaj sin ne fordonu al dogmoj. Tiel religio daŭre estos malpli grava aŭ eĉ ne ludos rolon en ilia vivo. La preĝejoj, temploj ktp ricevos pli da vizitantoj, kiuj aprezas arton kaj historion kaj malpli da tiuj, kiuj estas konvinkitaj, ke ilia kredo superas aliajn kaj nepre devas esti disvastigata.

Almenaŭ tion mi esperas, kvankam mi konscias, ke ŝanĝoj povas rapide alveni. La diverseco de kredoj estas unu formo de protektado kontraŭ hegemonio de iu religio, kiel okazis pasintece. Pro la modernaj teknologiaĵoj ne plu eblas ignori la riĉecon kaj diversecon de homa scio.

*Franciska Toubale (Aŭstralio)*

# Kred-libereco: komuna afero por religianoj kaj senreligiuloj

*Nyegosh Dube (Pollando)*

Jam plurfoje, tiu ĉi revuo publikigis artikolojn pri persekutado kontraŭ religiaj grupoj: Atestantoj de Jehovo en Rusio, kristanoj en Pakistano, islamanoj en Barato, kaj en antaŭaj jarcentoj: valdanoj en Italio kaj Francio, kaj paganoj en mezepoka Eŭropo. En multaj landoj religia persekutado ankoraŭ daŭras. En budhisma Mjanmaro (Birmo), islamaj rohinĝoj estas persekutataj, dum en Irano estas ne-islamanoj diversreligiaj, kiuj suferas tiun sorton, same kiel hinduoj en Bangladeŝo. En kelkaj islamaj landoj, kiel Sauda Arabio, ateismo estas mortpunebla. En Ĉinio okazas persekutado de la islamanaj ujguroj kaj de aliaj religianoj diversgrade. En Grekio, la efektive oficiala Grek-ortodoksa Eklezio provas subpremi la praktikadon de la tradicia politeisma religio, kiu havas kelkmil adeptojn. Kaj ekzistas ankaŭ multaj aliaj similaj kazoj.

Religia libereco certe estas subteninda de ateistoj, se ĝi klare inkluzivigas la liberecon esti malfermite ateisma kaj alimaniere nereligiema aŭ senreligia. En Usono, ekzistas “freedom of religion”, t.e. libereco de religio, sed ateistoj tie batalas por “freedom from religion”, t.e. libereco disde religio, kaj eĉ ekzistas la organizaĵo Freedom from Religion Foundation. Religio en tiu lando trudiĝas diversmaniere: sur usona mono aperas la devizo “In God We Trust” (en Dio ni fidas); politikistoj ĵuras al Dio, kiun ili ne malofte alvokas en siaj paroladoj; lernantoj recitas ĉiutage la Ĵuron pri Fideleco, kiu entenas la vortojn “unu nacio sub Dio”; en iuj ŝtatoj leĝoj postulas, ke la biblia Dekalogo estu videbla en klasĉambroj kaj leĝfarejoj. En Usono do la libereco praktiki iun ajn religion kaj la trudado de kristanismo neeviteble interpuŝiĝas.

En Ĉinio oni trovas la inversan situacion: la ŝtato estas oficiale ateisma kaj strikte regadas kristanajn eklezioj kaj aliajn religiajn organizaĵojn. Ekzemple, katolikoj povas laŭleĝe agi nur kadre de la Katolika Patriota Asocio. Oni malpermesas al ili havi ligojn kun la tutmonda Romkatolika Eklezio estrata de la papo, kvankam multaj katolikoj restas pap-fidelaj kaj praktikas subtere. La ĉina prezidanto deklaris, ke membroj de la Komunisma Partio devas esti “necedemaj marksismaj ateistoj”. Nur ĉirkaŭ 7% de ĉinoj apartenas al la partio, tamen la ŝtato ĝenerale malaprobas religion. Ĉiuokaze, ĉinoj estas grandparte nereligiemaj.

Kio estu la sinteno de ni ateistoj, aparte tiuj, kiuj loĝas en demokratiaj landoj? Laŭ mi, neniu ŝtate trudita religia kredo aŭ inverse ateisma nekredo estas akceptinda – homoj havu la liberecon kredi aŭ nekredi sen ajna trudado. Kompreneble ia ajn persekutado estas kondamninda. Ateistoj do subtenu religian liberecon kaj ĝenerale liberecon de kredo (certe inkluzive de libereco nekredi) kaj kontraŭstaru ŝtatan trudadon de ne nur religio kaj teismo, sed ankaŭ de ateismo. Kvankam la unua prioritato de ateistoj estas defendi siajn proprajn rajtojn – libere esprimi kaj publikigi sian nekredon, libere kunveni kaj organizi sin, kaj libere provi konvinki aliajn pri la ateisma mondrigardo – ili aktivu iagrade ankaŭ por defendi la rajtojn de religianoj, speciale en seriozaj kazoj, kie homoj frontas enkarcerigon aŭ mortpunon.

.

Estus bone se, ekzemple, internacia organizaĵo kiel Humanists International, krom aktivadi por ateistoj kaj aliaj nereligiuloj, povus ankaŭ atentigi kazojn de religia persekutado kaj esprimi subtenon, nome de la humanisma komunumo, por la persekutatoj. Apogi iun religian grupon povus esti iom tikle por humanisma aŭ

ateisma asocio, sed tia ago povus havigi al religianoj pli pozitivan impreson pri nia komunumo. Krome, ateistoj povus individue subteni viktimojn de religia diskriminacio, subskribante peticiojn, sendante retmesaĝojn ktp.

Krom en oficiale ateisma lando kiel Ĉinio, se ŝtato diskriminacias iujn religiajn grupojn, ateistoj ĝenerale frontas la saman sorton. Do des pli ateistoj devus subteni religian liberecon en ties vasta senco: plena libero kredi aŭ nekredi. En Rusio, oni persekutas kaj atestantojn de Jehovo kaj ateistojn. En diversaj islamaj landoj, oni persekutas ateistojn kune kun kristanoj, hinduoj, bahaanoj kaj aliaj. Do, estus bone se ateistoj/humanistoj povus, kie eblas, starigi aliancojn kun malfavorataj religianoj por kune batali por siaj rajtoj. Aliflanke, ateistoj devus kontraŭi provojn misuzi religian liberecon por trudi religion kaj malfortigi sekularismon.



# Nia racia heredaĵo

*Paul-Henri Lesprit (Francio)*

Oni plurfoje asertis al mi, ke esti senreligia estas ekvivalenta al "forĵeti la tradicion de sia lando". Mi kontraŭas tiun aserton. Se oni demandus min "je kio vi kredas", mi respondus "je la scienca metodo". Sed kiel skribis Albert Einŝtein: "scienco estas nur rafinado de ĉiutaga pensado". Pro tio, "je racia pensado" estus pli taŭga respondo. Scienco konsistas en ellaborado de teoriaj modeloj, kies prognozoj kongruas kun la konataj eksperimentoj/observataj faktoj, kaj kapablas prognozi la rezultojn de ankoraŭ nerealigitaj eksperimentoj/ankoraŭ ne observitaj faktoj. Kiam la prognozoj de modelo ne (plu) kongruas kun la faktoj, on ĉesas uzi ĝin. Same, racie pensadi konsistas en tio, ke oni bazas sian pensadon sur konataj faktoj, kaj estas kapabla adapti sian pensadon al novaj faktoj. Miavidpunkte, religioj simple estas modeloj, kiuj montriĝis nekongruaj kun observado.

Eĉ se la naskiĝo de moderna scienco rezultas de kontinua fenomeno, estas historia fakto, ke ĝi naskiĝis en Okcident-Eŭropo en la Renesanco, kaj mi ofte demandis min kial. Iutage, mi estis leganta en la metroo la "Meditaĵojn" de Marko Aŭrelio (romia imperiestro, kiu ĉiutage ĉerpis el siatempaj filozofioj por provi plenumi sian imperian taskon kiel plej pace kaj efike) kaj legis la jenan fragmenton: "Tio, kio mortas, ne falas ekster la Mondo. Se ĝi tie restas, sekve ĝi transformiĝas en proprajn elementojn, kiuj apartenas kaj al la Mondo kaj al si mem". Tiu citaĵo (kiu aperas diversforme ĉe Marko Aŭrelio kaj kompreneble referencas al la antikva atoma teorio) okulfrape similas al la fama frazo de Lavoisier, la fondinto de moderna ĥemio: "Nenio perdiĝas, nenio kreiĝas, ĉio transformiĝas." (Oni ĝenerale konsideras, ke tiu frazo estas revortumo de frazo de la helena filozofo Anaksagoro). Leginte tiun citaĵon, mi memoris el la historio de fiziko (kies studado estas unu el miaj ŝatokupoj) la jenan fakton: multegaj gravaj malkovroj de fiziko estas posteuloj de la helena scienco. La renesanca scienco radikas, almenaŭ parte, en la remalkovro en Okcident-Eŭropo de la helena heredaĵo, kiun kristanismo flankenmetis pro ĝia "paganeco". (Iuj diros, ke la konataj helenaj skribaĵoj estis kopiitaj de kristanaj ekleziuloj. Tio estas logika, ĉar nur ili kapablis skribi, sed multe pli da materialo estis perdita ol kopiita.)

Racia pridemandado pri la leĝoj de la Mondo estas heredaĵo multe pli malnova ol kristanismo (kiu estas ofte prezentita al mi kiel la "tradicia religio" de mia popolo). Tio, kio faras el ni homojn, estas heredaĵo veninta al ni el delonge forgesita praepoko.

# Ĉu nova identeco por nia asocio?

## *Bill Maxey (Usono)*

En aprilo mi profitis la ŝancon ĉeesti prezentaĵon de Peter Marty, eminenta luterana pastoro kaj ĉefredaktoro de la usona revuo *The Christian Century* (La Kristana Jarcento). Fondita en la jaro 1900, la periodaĵo, laŭ sia propra priskribo, estas pensiga, sendependa kaj progresema, "gvida voĉo, helpante legantojn fari sencon de kredo, kulturo kaj politiko en nia tempo". Ni ĉeestantoj ricevis donace la plej freŝan aprilan numeron.

Mi scivoleme legis nur kelkajn artikolojn sed atente trafoliumis la tuton. Mi baldaŭ rimarkis ke preskaŭ ĉiuj el la artikoloj, tre multspecaj, iel baziĝis sur la kristana Biblio. Malgraŭ la granda diverseco de la temoj kaj stiloj – inkluzive de historioj, raportoj, lecionoj, opiniaj eseoj, recenzoj k.a. – la frapa konstato estis ke la plimulto da kontribuintoj ĉerpis el tiu komuna fonto. Certe ankaŭ kleraj budhanoj fundamentas siajn eseojn kaj artikolojn pri ajna temo ĉefe sur la sutroj de la Budho, la judoj sur la Tanaĥo kaj ties komentarioj, kaj la islamanoj sur la Korano. Sendube aliaj religioj montras la saman tendencon. En ĉiu kazo do oni disponas komunan, konatan bazon por tiuj kiuj volas komenti aŭ kontesti iujn ideojn aŭ proponi alternativajn interpretaĵojn pli konvenajn al la nuntempaj kulturaj kaj sociaj cirkonstancoj.

Tia fonto tamen klare mankas al ni ateistoj. Ni ne havas eĉ unu fundamentan tekston – kaj certe ne kanonon – kiu stimulus nian pensemon kaj al kiu ĉiuj legantoj povus rilati. Tre kredeble tiu manko malhelpas nian seriozan kaj komunan traktadon de sociaj aferoj.

Montriĝas ke nia pensokampo (almenaŭ en ATEO) konsistas ĉefe en novaĵoj pri atencoj al religia libereco (ĉefe en Usono), statistikoj pri ŝanĝoj en religiemo, esplorado de la historio de ateismo kaj konataj ateistoj, la ĝena aroganteco de religiuloj kaj argumentoj kontraŭ la ekzisto de ia dio. Laŭ mi, tiuj temoj, kvankam certe interesaj, nek profundas nek fekundas kaj apenaŭ stimulas. Ili almenaŭ ne instigas niajn membrojn reagi.

Tiuj faktoj ŝajnigas al mi ke ATEO ne povos prosperi sen fundamenta ŝanĝo. Ni bezonas trakti aferojn pli gravajn, kiuj prezentas ideojn provokajn kaj vere pensigajn, kiuj elvokos reagojn kaj meritas interpretadon laŭ senreligia vidpunkto.

Mi ne scias ĉu ĉiuj ateistoj nomus sin "humanistoj" aŭ ne, sed preskaŭ certe ĉiuj *esperantistaj* ateistoj ja akceptus tiun etikedon. (Temas kompreneble pri "moderna humanismo" kaj ne la renesanca speco difinita en PIV.) Ĉar ni ne agnoskas ian dion kaj okupiĝas pri sociaj aferoj, nepras nuanci ĝin per "sekulara". Ni do povus identiĝi samtempe kiel ateistoj kaj sekularaj humanistoj.

Tiu nova identeco ebligus al ni facile religi nin kun niaj radikoj kiel esperantistoj, kun la tradiciaj ideoj kaj zorgoj de nia komunumo. La ideoj de d-ro Zamenhof rilate la internan ideon kaj homaranismon. La kompato por la homoj ambaŭflanke dum militoj kaj la deziro por paco. La temoj de la multaj literaturaĵoj kiuj reliefigas la efikojn de militado, subpremaj reĝimoj, homa krueleco kaj homa mizero, diskriminacio, konsumismo kaj multaj aliaj malbonaĵoj, sed ankaŭ la heroaĵojn kaj ofte sinoferajn agojn de tiuj kiuj rezistis la premojn. Ne surprize, preskaŭ ĉiuj tiuj temoj denove montras sin tre aktualaj en nia mondo sed ricevas malmultan atenton

en esperantistaj rondoj.

Ĉu ni pripensu tiun ĉi defion? Jen nur du el multaj ideoj konsiderindaj:

- Ni povus kunlabori por renovigi la zamenhofan *Deklaracion pri homaranismo*, retenante la plej bazajn principojn sed forĵetante aliajn por pli taŭgigi ĝin por la nuna mondo. Ĝi povus roli kiel fundamenta teksto por modernaj esperantistoj.
- Ni povus krei komentarion surbaze de *La infana raso*, unuaranga sendia verko kiu traktas multajn gravajn temojn. Ĝi emfazas jam en sia unua ĉapitro, ĉu ne, tion ke ĉiuj homoj ja estas gefratoj, ne ĉar ili estas "infanoj de Dio" sed ĉar sciencaj esploroj (aŭ almenaŭ matematiko!) pruvas tion. Sendube multaj nuntempaj esperantistoj ankoraŭ ne konas la verkon, kaj niaj klopodoj povus ripari tiun mankon.

Laŭ mia konstato la novaj generacioj de esperantistoj scias ĉiam malpli multe pri la fundamentaj ideoj de esperantismo. Denove akvumi la radikojn ŝajnas al mi inda projekto.

Kvankam ne necesas trakti la temon ĝuste nun, laŭ mia supozo ŝanĝi la nomon de la asocio helpus allogi pli da homoj kaj vigligi la diskutadon. Certe ni konsideras nin liberpensuloj kaj tre verŝajne ankaŭ sekularaj humanistoj. Nova nomo nepre aludu tiujn ideojn. Eble survoje ni demandu al Ralph Dumain kial li elektis *Ateista* anstataŭ vorto kun senco pli ampleksa. Necesas respekti nian propran historion, eĉ dum tempo de (eventualaj) ŝanĝoj.



"Atheism" (Ateismo) (Bildo de: Seb Agresti / The New Yorker)

# Dante: grandioza sed malfacila figuro el sekulara vidpunkto

*Nyegosh Dube (Pollando)*



Monumento al Dante – Florenco, Italio (Fonto: www.italyhiddenexperiences.com)

Tiu ĉi artikolo devintus esti verkita en 2021 kiam oni festis la 700-centan datrevenon de la forpaso de Dante Alighieri, sed almenaŭ ĉi-jare ni havas la 760an datrevenon de lia naskiĝo! Antaŭ kvar jaroj la ideo ne venis al mia kapo. Simple ĉar ĉi-jare kunlige kun studado de la itala lingvo (komencita jam antaŭ kelkaj jaroj), mi decidis konatiĝi pli bone kun la *Dia Komedio*, la plej fama verko de la plej fama verkisto itala. Kiam oni legas pri ĝi en la interreto, la laŭdado estas universala. Do oni faras ion riskan, aŭ almenaŭ nekutiman, se oni kritikas tiun verkon!

Mi ne tre kompetentas taksi la mezepok-itallingvan poezian verkadon de Dante en tiu epopea verko, eĉ se mia scipovo de la itala atingis sufiĉe altan nivelon, kaj volonte akceptas la laŭdojn pri lia verkado de la *Komedio*. Oni povas nur admiri la ambician skalon kaj strukturon de la verko. Aparte laŭdinda estas la malfacila rimad-sistemo “terza rima” ABA BCB CDC ktp, kiun sukcese sekvis tradukistoj kiel Laurence Binyon (anglalingva) kaj Kalocsay (esperanta) inter aliaj. Ĉiuokaze, tamen, mia celo ne estas taksi la literaturajn kvalitojn de la *Komedio*. Mia kritiko rilatas al la ĝenerala mesaĝo kaj al specifaj partoj, kiuj koncernas nekredantojn kaj alikredantojn – afero, kiu interesas nin ateistojn.

Venante rekte al la kerno de la problemo, mi diru, ke la *Dia Komedio* estas esence granda verko de katolika propagando, kvankam ne oficiala eklezia propagando. Ĝi prezentas katolikan koncepton de la postmorta mondo kun sia triobla dispartigo

en Paradizon, Purgatorion kaj Inferon. Dante influis la manieron laŭ kiu katolikaj kaj aliaj kristanoj rigardas tiujn lokojn, sed ankaŭ la ĝeneralan popularan bildon. Li celis kredigi la ideon, ke en la postmorta vivo (strange kontraŭdira ideo!) oni pagas por siaj pekoj faritaj dum sia tera vivo. Li prezentis tre detalan organizadon de Infero kun siaj famaj naŭ cirkloj, Purgatorio kun sep niveloj, kaj Paradizo kun naŭ ĉielaj sferoj. Tian koncepton de Paradizo li pruntis fakte de Aristotelo. La homoj en Infero neniam eliros ĉar ili ne pentofaris, dum tiuj en Purgatorio ("purigejo") faris tion kaj trairas longan purigan procezon antaŭ eniri Paradizon.

Tiu katolika koncepto de la triparta postmorta mondo kompreneble estas tute absurda. Ĝi estas koncepto por kiu absolute neniuj pruvoj ekzistas. Ne ekzistas pruvoj por homa pluvivado postmorta, nek por preternaturaj regnoj plenaj de diabloj, monstroj kaj anĝeloj! Dante konscie celis, ke la *Komedio* estu ilo por persvadi homojn sekvi la veran kristanan vojon per prezentado de amaso de kruelaĵoj kaj teruraĵoj, de punado kaj suferado, kiujn oni provu eviti. Jes, mezepoka pensmaniero de antaŭ 700 jaroj, sed ni konsideru ke 1300 jarojn antaŭ Dante, la romia poeto Lukrecio verkis la epopeon *De Rerum Natura*, kiu prezentis multe pli sciencan bildon. Troveblas diversaj eraraj asertoj en lia poemego (ekz. la plateco de la Tero), sed Lukrecio malakceptis dian regadon kaj intervenadon kaj la ekziston de postmorta mondo.

Krome, Dante arogante asignis multajn verajn figurojn al la diversaj niveloj de Infero, Purgatorio kaj Paradizo, inkluzive de politikaj malamikoj el sia naskiĝurbo Florenco. Li venĝis sin kontraŭ ĉi lastaj per eninferigo. Nu, certe en lia verko, la homoj estis asignitaj de Dio, tamen kiel aŭtoro, Dante mem decidis kion faris Dio! Laŭ lia asignado, paganoj antaŭkristanismaj kaj herezuloj finiĝas en Infero – la unuaj en relative nesevera parto nomita Limbo, sed la duaj en la sufiĉe severa sesa cirklo de Infero: nur tri cirkloj estas pli severaj.

Jen do sekva absurdaĵo: eminentaj antikvaj figuroj grekaj kaj romiaj (kiel Aristotelo, Homero, Horacio kaj Vergilio, la gvidanto de Dante tra Infero), kiuj vivis antaŭ la ekesto kaj disvastiĝo de kristanismo estis metitaj en Inferon de Dante. Ili estas la tiel nomataj "virtaj paganoj". Jes, Dante admiris ilin kaj tial faris grandan komplezon metinte ilin en la neseveran unuan cirklon, sed li ne povis koncepti alian lokon por ili ol Infero! Ili estis por eterneco perditaj kaj ekzilitaj en loko sen eliro, sen iu ajn ebleco atingi Paradizon. Dum jarmiloj antaŭ la (supozata) apero de Kristo, prosperis imponaj civilizacioj en Mesopotamio, Egiptio, Hindio, Ĉinio kaj Mediteraneo, sed por kristanoj en ties vasta aroganteco, tiuj civilizacioj estis malsuperaj kaj iliaj loĝantoj ne meritis eniri la Dian regnon. Oni devas demandi: kial la kristana dio aperis tiom malfrue kaj kiel tiuj civilizacioj sukcesis sen ĝi?! (Min samtempe ŝokis kaj amuzis legi artikolon publikigitan en 2021 de juna katoliko, kiu kritikis la Dantean koncepton de Limbo – laŭ li, vera katolika teologio asignas ĉiujn paganojn al la plena, suferegiga Infero!)

Ankaŭ alia grupo meritis eternecon en Infero laŭ Dante, sed en multe pli severa regiono infera, la sesa cirklo. Ili estis la herezuloj, difinitaj kiel homoj kiuj kredas, ke la homa animo mortas kun la korpo. Imagu: homoj severe kaj eterne punitaj simple pro filozofia kredo! Ne temis pri kristanaj herezuloj el la epoko de Dante kiel la Kataroj kaj Valdanoj, kiujn li ial prisilentis, sed ĉefe pri Epikuranoj (sufiĉe proksimaj al ni ateistoj), inkluzive de Epikuro mem, kiu vivis tri cent jarojn antaŭ Kristo. Tamen inter la epikuraj herezuloj Dante nombris kelkajn samepokanojn kiel la gvidanto de la kontraŭpapaj Gibelinoj en Florenco. (Dante apartenis al la porpapaj Gelfoj, sed poste aliĝis al la malpli papemaj blankaj Gelfoj.) Li eĉ metis en la sesan cirklon la renoman imperiestron

Frederiko la 2a (vidu *Ateismo* n-ro 32), kiu havis brilan kortegon en Palermo. Li estis kristano, sed liberpensa kaj malfermita al aliaj religioj, kaj celis konstrui sekularan ŝtaton. Tial li estis rigardata kiel herezulo kaj ekskomunikita trifoje de du papoj. Ĉe lia kortego ekestis la Sicilia Skolo de poezio, kiu multe influis Dante – sed tio ne savis lin de Infero!

Mi konkludu per iuj pozitivaj rimarkigoj pri Dante. Kvankam Dante disvastigis katolikan dogmaron kaj plene subtenis la papecon kiel la pintan religian aŭtoritaton, en la *Komedio* li estis kritikema pri la korupteco, avideco kaj politika potencstrebado de la Katolika Eklezio – kaj aŭdace asignis kelkajn papojn al Infero! Iagrade li anticipis la kritikojn de Hus kaj Lutero. En antaŭa verko, *De Monarchia*, Dante klare subtenis apartigon de la ŝtato disde la Eklezio, kio respegulis lian blank-Gelfan vidpunkton. Fakte, dum tricent jaroj ekde 1585, la libro estis malpermesita de la Eklezio – sed la *Komedio* eskapis tiun punon ĉar verdire ĝi estas grandskala spektaklo ilustranta katolikan teologion. Krom sia teologia valoro por kristanaj klerikoj kaj intelektuloj, ĝi ja restas post sep jarcentoj poezia majstroverko, kiu prilumas mezepokan pensadon, socion kaj scion, kaj literatura monumento al amo: amo por la muzo de Dante, Beatrice, kiu gvidis lin tra Paradizo, kaj amo por Dio fare de fidelulo.



Ilustraĵo de Infero el la Dia Komedio de Dante – farita de Gustave Doré (Fonto: Wikimedia Commons)

# La malfacileco esti ateisto en Italio

*D-ro Luigi Fraccaroli (Italio)*

Esti ateisto en Italio ne estas bagatela afero. Kompreneble, ne temas pri vivdanĝero kiel en kelkaj landoj, ĉefe teokratioj: nome, Afganio, Irano, Irako, Niĝerio, Sauda Arabio, Pakistano, Somalio, Sudano, Unuiĝintaj Arabaj Emirlandoj, Maŭritanio, Kataro, Malajzio, Maldivoj kaj Jemeno.

Tamen, la ekzisto, tutcentre de la lando (eĉ, en ĝia ĉefurbo), de la centra organiza sidejo de la plej granda monda religio prezentas kelkajn problemojn. La unuan problemon vidis ĉiuj homoj (ne estas troigo: ne eblis ne vidi ĝin) ĝuste en la tagoj de (la katolika) Pasko.

Romo estas ja la urbo plej plena je historiaj vidindaĵoj en la tuta mondo (Italio havas inter 60% kaj 75% de la artaĵoj de la tuta mondo, kaj ili koncentriĝas ĉefe en Romo) kaj tial allogas ĉiumonate centmilojn da turistoj. La urbo estas de jarmiloj la sidejo de la Katolika Eklezio, kio altiras ĉiumonate centmilojn da pilgrimuloj. Krome, ĉar 2025 estas jubilea jaro, ĉiumonate pliaj centmiloj da turistoj kaj pilgrimuloj venadas al Romo. Kaj Pasko, estante la ĉefa religia festo en Italio, altiras ĉi-periode eĉ pliajn centmilojn da turistoj kaj pilgrimuloj.

La lundon post Pasko ĉi-jare Papo Francisko mortis, kaj baldaŭ poste elektiĝis la nova papo: la kvanto da homoj invadintaj la urbon estas preskaŭ nekalkulebla. La nacia kaj urba registaroj devis aranĝi specialajn organizajn strukturon kaj planon por garantii decajn vivkondiĉojn al ĉiuj (ankaŭ al la romanoj) kaj gardi la sekurecon de la alvenintaj mondaj gravuloj. Miloj da soldatoj, policanoj, fajrobrigadistoj, kuracistoj, flegistoj kaj volontuloj estis engaĝitaj por tiu afero – ĉio organizita de la itala ŝtato: Vatikano zorgas nur pri la parto de la placo Sankta Petro apartenanta al ĝi, ĉio alia estas la problemo de Italio.

Krom tio, ne eblis eviti informojn pri tiuj du okazaĵoj en ĉiuj italaj naciaj televidretoj. Ĉio orbitas ĉirkaŭ la eklezio en la lando kaj ne nur kiam mortas papo.

La politiko en Italio estas grave influata de la Katolika Eklezio. Kvankam italoj deklaras sin pli kaj pli nereligiemaj, ekzistas leĝoj, kiuj senhonte favoras la katolikan eklezion kaj diskriminacias ĉefe senreligiulojn.

Ekzemple, leĝo ebligas kuracistojn *rifuzi* abortigi virinojn "pro konscienca kialo": nome, katolikaj kuracistoj rajtas rifuzi fari sian laboron, se temas pri abortigo. Praktike temas pri kuracistoj laborantaj en hospitaloj mastrumataj de ekleziaj firmaoj (multaj, en Italio), kaj kuracistoj de ŝtataj hospitaloj, kiuj preferas ne damaĝi sian karieron kaj akceptas la politikon de la instanco kie ili laboras. Ĉiuj estas pagataj per la mono de ĉies impostoj (tiuj ekleziaj havas interkonsenton kun la Ŝtato, ke ili donu publikan servon kontraŭ repago de la kostoj), sed abortigo estas "speciala" servo, kiun kuracisto rajtas ne doni. Tio kaŭzas, ke en multaj regionoj (ĉar en Italio la sansistemo funkcias laŭregione) ne eblas abortigi (kaj virinoj loĝantaj tie devas vojaĝi aliloken en la lando), dum la malmultaj porabortigaj ginekologoj faras praktike nur tion, kun – kiel aludite – damaĝo al siaj karieroj. La sama leĝo permesas al la kontraŭabortigaj asocioj propagandi en lokaj sancentroj, kion ili faras en ofte tre agresema maniero (multaj eksterlandanoj ne scias, kiom fanatikaj povas esti la ekstremkatolikoj), kio evidente estas tre prema por virinoj jam malfortaj, decidinte abortigi.



Placo Sankta Petro, Vatikano / Romo – la funebro de Papo Francisko (Foto de: Alessandra Tarantino / AP)

Alia leĝo ebligas al ĉiu impostopaganto donaci 8 elmilojn de siaj impostoj por la Ŝtato aŭ organizitaj religioj. Ĝis nun, en la listo de eblaj ricevantoj estas: la Ŝtato, la Katolika Eklezio, kvin protestantaj eklezioj, du budhanaj organizoj, unu ortodoksa eklezio, la unuiĝo de la judaj komunumoj, kaj la unuiĝo de hinduoj. Bona celo, certe, kvankam iom favoranta la ekleziojn diskriminacie al la senreligiuloj. Kie kaŝiĝas la problemo? Tiuj, kiuj elektis al kiu donaci siajn 8 elmilojn, decidas ankaŭ por tiuj, kiuj faris neniun elekton! Imagu (veraj nombroj), ke el ĉiuj impostpagantoj nur 40% indikis en la impostdeklaro al kiu donaci 8 elmilojn. Imagu, ke, el tiu 40%, 70% elektis la katolikan eklezion (do 28% de ĉiuj impostpagantoj): la rezulto estas, ke 70% de 8 elmiloj *de ĉies impostoj* iras al la Katolika Eklezio, kvankam tion elektis nur 28% de la rajtantoj. Pro tio, ke la Ŝtato ne varbas por si mem, dum la Katolika Eklezio tre abunde varbas por si mem, tiu 70% probable eĉ kreskos en la estonteco.

Pli-malpli antaŭ unu jarcento (1929, kiam la tiama faŝisma Ŝtato subskribis interkonsenton kun la Sankta Sidejo) en la italaj lernejoj fariĝis deviga la instruado de la katolika religio, unu horon semajne. En 1984 nova interkonsento ebligis la aranĝon de t.n. "alternativa horo", dum kiu la lernantoj/studentoj povas sekvi aliajn agadojn organizitajn de la lernejo. Kie kuŝas la problemo? Multaj lernejoj (tutunue tiuj katolikaj, kiuj tamen ricevas subvenciojn de la Ŝtato, sed ankaŭ multaj ŝtataj) simple ne organizas tiujn agadojn, kaj lasas la lernantojn/studentojn ne elektintajn la katolikan religion kun horoj sen lecionoj. Tio ofte konvinkas la familiojn tamen registri la gefilojn por la religiaj lecionoj por ne perdi kontakton kun la klaso.

Laŭkonstitucie la Ŝtato estas laika, sed por ne agi kontraŭ la deziroj de la Katolika Eklezio, la parlamento kaj la registaro ofte ŝajnigas respekti la leĝojn, dum efektive ili ignoras ilin (ne forgesu, ke temas pri Italio!). Ekzistas la imposto sur loĝeblaj konstruaĵoj (IMU), kiun devas pagi ĉiu posedanto de konstruaĵo, krom se tiu estas la propra hejmo. Do, ĝin devas pagi ankaŭ hoteloj kaj simile – sed ĝin ne pagas preĝejoj kaj temploj. Kie kuŝas la problemo? La difino de "preĝejo" aŭ "templo". En Italio, la Katolika Eklezio posedas milojn da hoteloj kaj similaj turismaj strukturoj – normale, ĉu ne? – kiuj

tamen registriĝis kiel "preĝejoj" ĉar en unu ĉambro estas kapelo! Kaj la leĝo permesas al ili ne pagi la IMU-n, perdigante al la Ŝtato plurajn centojn da milionoj da eŭroj ĉiujare.

En Italio la geedziĝo en katolika preĝejo validas ankaŭ por la Ŝtato: dum la religia ceremonio oni faras paŭzon, dum kiu oni legas la artikolojn de la koncerna leĝo. Eblas ankaŭ geedziĝi nur civile, en la urbodomo: sed nur por viro kaj virino. Samseksaj paroj ne povas geedziĝi. Por ili ekzistas de malmultaj jaroj aparta speco de unuiĝo, kun malpli da rajtoj ol la geedziĝo. Ekzemple, la gefiloj ofte ne rajtas agnoskon fare de la urbestro, kiu povas rifuzi enskribi ilin kiel gefilojn de ambaŭ paranoj.

Ekzistas asocio, fondita en 1991, kiu okupiĝas pri ateistoj kaj agnostikuloj, Unuiĝo de Ateistoj kaj Agnostikuloj Raciismaj (UAAR). Ĝi klopodas disvastigi la ateisman vidpunkton pri multaj temoj, el scienca kaj objektiva vidpunkto. Unu el la plej konataj kampanjoj estas pri "malbaptado": la Katolika Eklezio bazas siajn statistikojn sur la nombro de baptitoj en la lando, kiu tamen ne kongruas kun la nombro de veraj kredantoj (oni estas baptita kiel eta infano, tute ne konscie). UAAR proponas do "malbaptiĝi" kaj tion komuniki al la propra paroĥejo, por eliri el la oficialaj statistikoj de la Katolika Eklezio.

Do: vere malfacilas ateisti en Italio!



# "Operaco Sindur”: barata religia simbolo dum milito

*A. Giridhar Rao (Barato)*

La 22an de aprilo 2025, ekstremistoj el Pakistano mortigis 26 virojn, preskaŭ ĉiuj hinduoj, en turisma urbo en la barata Kaŝmiro. Laŭ postvivantoj, la mortigintoj apartigis la virojn de la virinoj. Ili postulis al ĉiu viro deklami islamajn religiajn versojn. Se tiu ne kapablis, li estis pafita. Barato kulpigis Pakistanon kaj lanĉis "Operacon Sindur". Barato atakis plurajn celojn en Pakistano. Pakistano respondis per siaj propraj atakoj. Post kvar tagoj da milito kaj la mediacio de pluraj landoj, inkluzive de Usono, la du landoj deklaris batalhalton.

**Operaco Sindur.** La sanskrit-devena vorto *sindur* [sinduur] estas la ruĝa pulvoro, kiun multaj hinduaj virinoj metas en la disigon de siaj haroj por indiki, ke ili estas edziniĝintaj. Vidvinoj ne metas *sindur*. Tial ĝi estas potenca socia simbolo en Sud-Azio. Multaj esprimoj, proverboj, poemoj, kantoj kaj filmoj en multaj lingvoj en Barato daŭre uzas la simbolon. La nomo "Operaco Sindur" tiel substrekas, ke la ekstremistoj mortigis *hinduajn* virojn, kaj Barato venĝas tiujn mortojn kontraŭ *islama* nacio, Pakistano.

Ĉi tiu uzo de religia simbolismo konformas al la ideologio de la reganta dekstra registaro en Barato. La reganta partio estas BJP (Barata Popola Partio) kaj ĝia ideologia gepatro estas RSS (hindia mallongigo de "Nacia Volontula Organizo"). Ambaŭ organizoj malkaŝe argumentas, ke Barato estu hindua lando. Islamanoj, precipe, estas nomataj "eksteruloj".

La BJP, jam en sia dua oficperiodo, ricevis multe da laŭdo en la ĉefaj amaskomunikiloj kaj ankaŭ en sociaj retoj pro la elekto de la nomo "Operaco Sindur". La nomo estis laŭdita kiel simbolo de virina kolero, de la funebro de la (hinduaj) virinoj kiuj perdis siajn edzojn en la atenco en Kaŝmiro. La milita respondo de Barato estis vidita kiel venĝo por la malhonoro de ĉi tiuj virinoj. Ĉefministro Modi deklaris, “en miaj vejnoj nun fluas varma *sindur*!”

Aliflanke, multaj aliaj en Barato reagis negative al ĉi tiu ekspluatado de la simbolo de *sindur*. Por ili, *sindur* estas simbolo de hindua patriarkeco. La rifuzo de virino meti *sindur* indikas malfidelecon aŭ ke ŝi ne volas esti en la geedzeco. Efektive, eĉ la tribunaloj en Barato jam ofte prezentas tiun rifuzon kiel pruvon!

Se *sindur* estas vidata kiel patriarka metaforo por dominado, tiam, laŭ ĉi tiu sekcio, ĝia uzo en milita konflikto ankaŭ igas la konflikton seksa konkero. Ĉi tio estas ciklo de reciproka malhomigo de la korpoj de virinoj.

**Virinoj kiel la "vizaĝo de milito".** Krome, dum la tuta konflikto, ĉiutagaj informkunvenoj por la barata amaskomunikilaro estis kondukitaj de du virinaj oficiroj. Unu el ili estas islamanino kaj la alia estas hinduino. Denove, ekzistas diametre kontraŭaj vidpunktoj pri ĉi tiu decido.

Subtenantoj vidas ĉi tion kiel pruvon de la seksa kaj religia inkluvizeco de Barato. Kiam la lando alfrontas militon, la voko al nacia devo dissolvas religion kaj sekson.

Multaj malkonsentas. Ili argumentas, ke ĉi tio estas falsa rakonto pri virina povigo en Barato. Unue, seksa subpremo daŭre estas ĉiutaga realo en Barato. Due, "kiam feminismaj lingvo kaj bildoj estas uzataj por pravigi militismon, ni riskas perdi vidon de la kernaj principoj de socia justeco: paco, egaleco kaj digno de ĉiuj homoj" (Global Voices South Asia).

# Ĉeĥio: ateisma fortikaĵo meze de Eŭropo

*Nyegosh Dube (Pollando)*

Super la belega urba pejzaĝo de Prago, la ĉeĥa ĉefurbo, impone leviĝas la katolika katedralo de Sankta Vito, kies konstruado daŭris 600 jarojn ekde la 14a jarcento. Kaj super la pitoreska praga Malnovurba Placo leviĝas la Týn-preĝejo, ankaŭ katolika kaj kelkjarcenta, kun tre interesaj turoj, kiuj aspektas kiel raketoj. En la dua plej granda ĉeĥa urbo, Burno, kie ariĝos Esperantistoj por la UK de 2025, troviĝas la simile impona katedralo de Sanktaj Petro kaj Paŭlo. Sed tute kontraste imponas ankaŭ la fakto, ke en Ĉeĥio, 66% de la loĝantoj ne kredas je la ekzisto de Dio aŭ dioj, kaj nur 21% nomas sin katolikoj. Do efektive du-trionoj de ĉeĥoj estas ateistoj, kvankam nur 25% nomas sin tiel. Tamen, kio estas ateisto? Persono, kiu ne kredas je Dio aŭ dioj, do jes, 66% da ĉeĥoj estas ateistoj senkonsidere kiel ili nomas sin!

La supre-citataj statistikoj venas de enketo pri religiaj kredoj tutmondaj farita de la respektata usona Pew Research Centre, sed ili estas el la jaro 2017, do iom malnoviĝintaj. Pli freŝajn ni havas en la ĉeĥa popolnombrado de 2021. Respondado al la demandoj pri religio estis nedeviga – el la 70%, kiuj respondis ĉi-rilate, 68% indikis, ke ili estas *sen religia kredo*. Tiu frazo ne estas klarigita de la popolnombrada instanco, sed mi provos interpreti ĝin. Estas diferenco inter “sen religia kredo” kaj “senreligia”. La dua signifas, ke oni ne apartenas al iu ajn religio, ne nomas sin ano de iu religia grupo aŭ eklezio, do oni povus esti senreligia sed ankaŭ kredi je Dio aŭ dioj aŭ ia alia supernatura, kosma forto. Aliflanke, la unua signifas, ke oni ne kredas je Dio aŭ dioj, nek je aliaj supernaturaj fortoj, sur kiuj la religioj estas kutime bazitaj. Sekve, laŭ mi “sen religia kredo” estas tre proksima al la Pew-kategorio nekredado je Dio aŭ dioj. Do, efektive 68% estas ateistoj laŭ la oficiala ĉeĥa popolnombrado de 2021, iomete pli ol la 66% de la Pew-enketo de 2017. Tial, kun alta nivelo de certeco, oni povas aserti ke Ĉeĥio estas ateisma fortikaĵo!

Ankaŭ interesaj estas aliaj religiaj statistikoj el tiu popolnombrado. El la preskaŭ 32% kiuj indikis, ke ili estas kredantoj, 41% estis senreligiaj, t.e. ne estis anoj de eklezio aŭ alia formala grupo de kredantoj. Se oni kombinas la homojn sen religia kredo kaj tiujn senreligiajn, oni alvenas al tre rimarkinda 81%! Kaj el la kredantoj, kontraste al la 41% senreligiaj, nur 32% nomas sin katolikoj – kio estas nur 10% el ĉiuj homoj, kiuj respondis pri religio en la popolnombrado, do duono de la elcento en la Pew-enketo. Favore al la katolikoj eblas diri, ke ili restas la plej granda religia grupo en Ĉeĥio, sed tiu grandeco ja ne estas tre impona! Alia interesa afero estas la niveloj de manko de religia kredo laŭ regionoj – estas klara divido inter Bohemio (kie situas Prago) kaj Moravio (kie situas Burno). La nivelo de senkredeco estas malpli alta en Moravio, kaj sekve la nivelo de kredado estas pli alta tie, sed nur en unu regiono de Moravio troviĝas pli da kredantoj ol nekredantoj. Tio estas la regiono plej proksima al Slovakio, multe pli religia, pli katolika lando ol Ĉeĥio.

Kial la nivelo de efektiva ateismo estas tiom alta en Ĉeĥio? Por kompreni la nunan religian bildon de tiu lando, plej gravas unu nomo: Jan Hus (1369-1415). Li estis katolika pastro, teologo kaj profesoro el Bohemio, kiu aktive diskonigis siajn ideojn por reformado de la Eklezio. Li kritikis la malmoralan konduton de la klerikaro, speciale la vendadon de indulgencoj kaj eklezaj oficoj – eĉ la papo ne eskapis lian kritikadon – kaj ankaŭ kondamnis krucmilitadon. Krome Hus defendis la naciajn rajtojn de la ĉeĥoj, speciale la uzadon de ilia lingvo (anstataŭ la latina) por religiaj celoj. Tial li fariĝis tre populara inter ordinaraj homoj, sed la Eklezia estraro ne tro kontentis. Ili venigis Hus al

Konstanco (en nuna Germanio) por ĉeesti gravan Eklezian koncilion, kun garantio de persona sekureco, sed tio estis trompo: li estis kondamnita por herezo kaj ŝtipar-bruligita!



Jan Hus, ĉeĥa religia reformisto, kaj fone monumento al li en Prago (Fonto: www.thecollector.com)

Tiu ruza, fia ekzekuto provokis protestojn en Bohemio, la Unuan Elfenestrigon de Prago en 1419 (kiam husanoj, t.e. sekvantoj de Hus, mortigis urbajn funkciulojn ĵetante ilin el urbodomaj fenestroj), kaj fine la Husanajn Militojn, kiuj eksplodis sekve de kontraŭhusana krucmilito lanĉita de la Papo en 1420 (nur la unua el kvin tiaj krucmilitoj). La husanajn militfortojn estris alia fama figuro, Jan Žižka, kiu montriĝis genia komandanto batalante dum la unuaj tri krucmilitoj. La Husanaj Militoj daŭris 35 jarojn, kaj dume husanoj batalis ankaŭ inter si – la pli radikalaj taboranoj estis venkitaj de koalicio de moderaj husanoj (utrakvistoj) kaj katolikoj en 1434. La sekvontaj jardekoj estis plejparte pacaj kaj en 1485 formala interkonsento estis subskribita donante egalan statuson al katolikoj kaj utrakvistaj husanoj – la lastaj fakte ampleksis 85% de la loĝantaro.

Sed rekomenciĝis konfliktoj religiaj-naciaj kiam la katolika Habsburga dinastio gajnis la bohemian tronon en 1526 kaj okazis ribeloj de husanoj-protestantoj (jam aperis Lutero kaj disvastiĝis la Reformacio). Kiam la bohemia nobelaro kaj burĝaro elektis la protestanton Frederikon la 5an kiel la bohemian reĝon en 1619, la habsburga imperiestro Ferdinando la 2a organizis internacian katolikan armeon, kiu invadis Bohemion en 1620 kun la celoj regajni la tronon kaj subpremi husanismon/protestantismon en tiu lando. En la ŝlosila Batalo sur Blanka Monto apud Prago venkis la katolikaj fortoj. La rezulto estis deviga rekatolikigo, ekziliĝo de granda parto de la nobelaro, publikaj ekzekutoj de 27 nobeloj, malfortiĝo de ĉeĥa kulturo kaj lingvo – kaj subigo al Habsburga regado dum 300 jaroj. Malgraŭ Blanka Monto, la husana spirito daŭris kaj plejparte ĉeĥoj restis katolikoj nur nome. Por la plimulto de ili, la Katolika Eklezio estis kaj restas ligita kun eksterlanda okupacio.

Post la kolapso de la Habsburga Imperio kaj la kreiĝo de Ĉeĥoslovakio en 1918, multaj forlasis katolikismon kaj nove starigita husana eklezio rapide kreskis atingante preskaŭ 800 mil membrojn ĝis 1930. Tamen pli grave, en la kondiĉoj de libera, progresema demokratia ŝtato kreskis ankaŭ sekularismo kaj malakcepto de ĉiuj religioj. Dum la komunisma epoko, kiam religio estis oficiale malaprobata, la husana eklezio malkreskis kune kun aliaj. Malkiel Pollando, kie la Katolika Eklezio rolis kiel aŭtonoma kontraŭforto kaj spirita rifuĝejo dum komunisma regado, en Ĉeĥoslovakio, neniu eklezio tiel rolis, kaj pro forta ŝtata subpremado kaj pro popola sekulareco. La falo de la kvardekjara komunisma reĝimo en 1989 neniel revekis religiemon – fakte ĝi plue malkreskis. Malgraŭ la nuna malforteco de la husana religio en Ĉeĥio, Hus kaj Žižka restas grandaj herooj tie. Ne estas troigo aserti, ke ateistoj devus danki ilin, kaj la tutan husanan movadon, pro ilia rezistado al la Katolika Eklezio kaj antaŭenigado de la rajto de ĉeĥoj libere elekti siajn kredojn. Fine, okulfrape alta elcento de ili elektis neniun religian kredon, neniun religion.

# Ateistoj asertas, ke Indonezio malpermesas senreligian vivadon

*Indonezia leĝo postulas la elekton de religio por montri en personaj identigiloj. Nekredantoj asertas, ke tio diskriminacias ilin.*

En januaro ĉi-jare, la Konstitucia Kortumo de Indonezio nuligis klopodon certigi rajtojn por ateistoj kaj nekredantoj. La Kortumo decidis, ke civitanoj devas elekti religion, eĉ se minoritatan, por oficialaj dokumentoj, kaj ke geedziĝo devas sekvi religiajn normojn.

Indonezio, kiu estas la plej granda islama nacio en la mondo, oficiale agnoskas ses religiojn: islamon, protestantismon, katolikismon, budhismon, hinduismon kaj konfuceismon. Alikredanoj povas suferi diskriminacion, sed ateistoj kaj nekredantoj eĉ ne estas agnoskitaj de la leĝo.

En 2012, ŝtata oficisto Alexander Aan kondamniĝis al 30-monata enkarceriĝo pro tio ke li plusendis ateisman materialon en Facebook. La kriminala kodo de Indonezio punas blasfemon kaj disvastigon de ateismo, kvankam, teknike, ĝi ne punas ateismon mem, nek mankon de religia kredo. Tamen, nekredantoj opinias, ke la nuna leĝaro estas uzata laŭ la bontrovo de la instancoj por senigi ilin je egalrajta leĝa protekto.

En januaro de 2024, la Konstitucia Kortumo permesis al anoj de minoritataj religioj, kiuj ne estas inkluzivitaj en la grupo de oficiale agnoskitaj religioj, marki sin kiel nespecifajn "kredantojn" sur identigiloj. Aktivuloj esperis, ke tio ekigos proceđon por inkluzivigi la opcion "neniu religio". Sed tiu espero detruiĝis la pasintan oktobron, kiam la peto de du agnostikaj aktivuloj, Raymond Kamil kaj Teguh Sugiharto, al la

## Niĝeria ateisto liberigita post kelkjara enkarcerigo

En la numero de novembro 2020 de *Ateismo*, ni raportis pri la enkarcerigo en aprilo tiujare de Mubarak Bala, la prezidanto de la Humanisma Asocio de Niĝerio. Lia krimo: blasfemo. En 2022 li estis kondamnita al 24-jara malliberigo, sed poste apelacia kortumo malpliigis la punon al kvin jaroj. Feliĉe en aŭgusto 2024, pro la klopodoj de Humanists International kaj aliaj internaciaj organizaĵoj, Bala estis liberigita post kvar jaroj de enkarcerigado. Vivinte kelkajn monatojn sekrete en sekuraj lokoj en Niĝerio, li veturis al Germanio en aprilo ĉi-jare por 6-monata restado organizita de la Humanisma Asocio de Germanio. Espereble, post la reiro al sia hejmlando, Bala ne plu estos minacata de leĝa persekutado, nek spertos mortminacojn kiel okazis antaŭe. Tamen, certe la situacio por ateistoj restas danĝera en tiu lando kaj en diversaj aliaj landoj de Afriko, Mezoriento kaj Azio.

*Fontoj: Humanists International kaj BBC*



Mubarak Bala kun Michael Bauer, prezidanto de la Germana Humanisma Asocio (Fonto: www.humanistische-vereinigung.de)

Konstitucia Kortumo, malsukcesis. Ili petis, ke nekredantoj havu la rajton ne plenigi la datumon "religio" en oficialaj identigiloj.

## La kortumo blokas peticion de nekredantoj

Juĝisto de la Konstitucia Kortumo Arief Hidayat juĝis kontraŭ la peticio en januaro ĉi-jare, kaj deklaris, ke religia kredo estas "neceso" laŭ "Pancasila", kaj ke ĝi estas konstitucia postulo. "Pancasila" estas la kerna ideologio de Indonezio. Ĝi sanktigas kredon al ununura, supera diaĵo. Juĝisto Hidayat argumentis, ke postuli religian kredon konsistigas "proporcian limigon", kaj tial, tio estas nek arbitra, nek subprema.

La Konstitucia Kortumo ankaŭ malakceptis alian peticion prezentitan de Kamil kaj Sugiharto. Ili argumentis, ke la ekzisto de paragrafo en la Geedza Leĝo, laŭ kiu normas, ke geedziĝo estas valida nur se ĝi okazas laŭ la leĝoj de la koncernaj religio kaj kredo, estas diskriminacia.

Laŭ lokaj amaskomunikiloj, la juĝisto Hidayat asertis, ke "manko de reguloj por permesi ke indonezianoj ne elektu kredon aŭ religion", por validigi geedziĝojn laŭ propra kredo aŭ religio, "ne konsistigas diskriminacian konduton". Tamen Ignatius Yordan Nugraha, spertulo ĉe la Altlernejo Hertie en Berlino, skribis jene en *Verfassungsblog*, germana komunikilo pri internaciaj konstituciaj aferoj: "La kortumo esence decidis, ke 'ne estas spaco' por la libereco esti senreligia".

## Kiom kutima estas ateismo en Indonezio?

Kvankam ateismo estas severe malaprobita, laŭ esploroj, nekredo ne estas malofta en Indonezio. Klerulo Hanung Sito Rohmawati taksas en eseo, ke ĉirkaŭ 3,5 milionoj da indonezianoj, el 270 milionoj da loĝantoj, estas ateistoj. La veran nombron oni ne scias, ĉar, laŭ aktivistoj, multaj nekredantoj kaŝas sian mankon de kredo por eviti diskriminacion, ĉikanadon aŭ procesadon.

Andras Harsono, esploristo de Human Rights Watch (HRW), organizaĵo kiu okupiĝas pri homaj rajtoj, diris al Deutsche Welle (DW, germana dissenda servo), ke la decido de la Konstitucia Kortumo ne surprizas lin. Indonezio spertis pliiĝon de islama fundamentismo ekde la falo de la aŭtoritatema prezidanto Suharto en 1998 kaj, laŭ Harsono, "la naŭ juĝistoj de la kortumo ne estas imunaj kontraŭ islama fundamentismo". La Konstitucia Kortumo emfazis, en juĝo de 2010, kiu konfirmis leĝojn, kiuj krimigas blasfemon, "la principon de unusola dieco kiel ĉefa principo" de la leĝo, aŭ alivorte, ke religieco estas "mezurilo [...] por determini ĉu leĝo estas konstitucia".

## La rajtoj de nekredantoj plejparte estas nerimarkitaj

La decido de la Konstitucia Kortumo kontraŭ nekredantoj altiris malmultan internacian atenton. La rajtoj de minoritataj kredoj en Sudorienta Azio fariĝis vigle pridisputata temo en la lastaj jaroj, ĉefe ekde kiam la birma armeo provis genocidi kontraŭ la islama minoritata komunumo rohinĝa en 2016. La usona registaro kaj la germana parlamento laŭte kritikis la registarojn de komunisma Vjetnamio kaj Laoso, pro subpremado de religiaj minoritatoj. Sed agnostikuloj kaj ateistoj diras, ke ili ricevas malmultan internacian protekton. Papo Francisko ne menciis nekredantojn dum sia tre diskonigita vizito al Indonezio en septembro 2024.

"Humanists At Risk: Action Report 2020" (Humanistoj sub risko: ago-raporto 2020), raporto de la ne-registara organizaĵo Humanists International, dokumentis "mankon de apartigo inter ŝtato kaj religio, kaj amason de taktikoj uzataj kontraŭ humanistoj, ateistoj kaj nereligiuloj" en pluraj sudorient-aziaj ŝtatoj, inkluzive de Indonezio, Malajzio kaj Filipinoj.

Reprezentanto de Eŭropa Unio parolis al DW pri la temo de kred-libereco, kvankam tiu ne specife komentis pri la juĝo de la Kortumo. "EU antaŭenigas kaj subtenas la

rajton de ĉiuj individuoj havi religion, kredi, aŭ ne kredi, same kiel la rajton manifesti kaj ŝanĝi aŭ forlasi sian religion aŭ kredon sen timo de perforto, persekutado aŭ diskriminacio," diris la reprezentanto. Tiu aldonis: "Ni regule diskutas la gravecon garantii liberecon de religio aŭ kredo, inkluzive de la rajto ne kredi, en taŭgaj forumoj kiel la EU-Indonezia Dialogo pri Homaj Rajtoj," kies plej nova eldono okazis en julio.

Malgraŭ la juraj malsukcesoj, Harsono de HRW kredas, ke progreso ankoraŭ atingeblas. Pri la plej lasta decido de la Konstitucia Kortumo, li diris, "eblas defii la verdikton", kvankam li agnoskis, ke tiu procezo povus daŭri longe. "Ni bezonas eduki homojn por ke ili komprenu la principon de religia libereco kaj kredo en Indonezio," li komentis. Tamen, la spertulo Nugraha opinias, ke la decido de Hidayat de januaro ĉi-jare "malfermas la pordon al pli da konstituciaj peticioj kontraŭ leĝoj, kiuj ne konformas al tutreligiaj valoroj."

*Artikolo de David Hutt, publikigita ĉi-februare en la anglalingvo retejo de Deutsche Welle, germana ŝtata elsendanto por eksterlando, kaj tradukita de* ***Manuel Giorgini (Italio).***



Indoneziaj islamanoj preĝas (Foto de: Robertus Pudyanto / Getty Images)

# ATEISMO

## ENHAVO


**VORTO DE LA REDAKTORO** 2

**ATEISMA VIVO**
La protektado de religiaj rajtoj: ĉu pli grava ol defendi aliajn rajtojn? 3
Justeco, religia libereco kaj ateistaj prioritatoj 4
Defendi religian liberecon... nur kadre de la homaj rajtoj 5
Ateistoj, penslibereco kaj religia libereco en Afriko 6
Aktivi por religia libereco: strategioj por ateistoj 9
De religia libereco al racia pensado en Aŭstralio 10
Kred-libereco: komuna afero por religianoj kaj senreligiuloj 11

**PRIPENSIGOJ**
Nia racia heredaĵo 13
Ĉu nova identeco por nia asocio? 14
Dante: grandioza sed malfacila figuro el sekulara vidpunkto 16

**ĈIRKAŬ LA MONDO**
La malfacileco esti ateisto en Italio 19
"Operaco Sindur": barata religia simbolo dum milito 22
Ĉeĥio: ateisma fortikaĵo meze de Eŭropo 23
Ateistoj asertas, ke Indonezio malpermesas senreligian vivadon 25
Niĝeria ateisto liberigita post kelkjara enkarcerigo 25



Bonvolu sendi viajn artikolojn al la redaktoro:
ateismo.bulteno@gmail.com
Por informoj bonvolu skribi al la sekretario:
anna.lowenstein@esperanto.org



Prezidanto: Giridhar Rao (Barato)
Sekretario: Anna Lowenstein (Britio), Kasisto: Dieter Rooke (Svislando)
Redaktoro: Nyegosh Dube (Pollando), Grafikisto: John Greenwood (Britio)
Lingva kontrolo: Bill Maxey (Usono), Anna Lowenstein (Britio)
La Estraro de ATEO ampleksas ĉiujn listigitajn ĉi-supre
kune kun Roberto Garcia (Britio)

Jarkotizo (kun reta revuo): €13 (A-landoj) / €10 (B-landoj) / €6 (Afriko)
Jarkotizo (kun papera revuo): €16 (A-landoj) / €13 (B-landoj kaj Afriko)
Konto: **ateo-y** ĉe UEA